

Esperanto kaj UN

Informilo de la oficejo de UEA por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 72, septembro-oktobro 2024



Universala Esperanto-Asocio

Tanzanio: Momentoj el la 109-a Universala Kongreso de Esperanto

La unuan fojon en sia historio, la ĉiujara Universala Kongreso de Esperanto okazis en la kontinento de Afriko – de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 2024. Sub la ĝenerala temo “Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo,” ĉirkaŭ 850 homoj renkontiĝis en Aruŝo, Tanzanio, por pasigi semajnon de oficialaj kunvenoj, sciencaj kaj kulturaj aranĝoj, prelegoj, kaj (en la tagoj antaŭ la kongreso) ekskursoj.



Preskaŭ duono de la ĉeestantoj venis el la afrika kontinento mem, precipe el Tanzanio, Burundo kaj la Demokratia Respubliko Kongo – el entute dek sep afrikaj landoj.

La kongreson antaŭis Dua Internacia Konferenco de Afrikaj Virinoj, prezidata de d-rino Miora Raveloharison (Madagaskaro) kaj alparolata de (inter aliaj) d-rino Gong Xiaofeng (Ĉinio), estrarano de UEA pri virinaj aferoj, kaj d-ro Duncan Charters (Usono), prezidanto de UEA. En siaj rimarkoj, d-rino Gong anoncis formiĝon de nova Komisiono de UEA pri Virinaj Aferoj.

Same antaŭ la kongreso okazis akcepto en Hago, Nederlando (la lando de la sidejo de UEA), en kiu Ambasadoro Giorgio Novello el Italio, nome de la gastiganta lando de la pasintjara Universala Kongreso de Esperanto (Torino, Italio), ceremonie transdonis la stafeton al la ambasadoro de Tanzanio, Ŝia Ekscelenco Caroline Kitana Chipeta, en ĉeesto de aliaj membroj de la diplomatia komunumo.

La fina kongresa rezolucio ne nur vokis al pli granda atento al mediprotektado kaj la redukto de forcejaj gasoj, sed ankaŭ atentigis pri la rolo de la svahila lingvo kiel regiona, supernacia lingvo, kiu faciligas komunikadon inter orientafrikaj nacioj “sen bezono uzi lingvon de iamaj koloniaj imperioj” – kaj al la simila uzo de Esperanto kiel mondvesta lingvo identigebla kun neniu unuopa ŝtato: “Por tutmonda interkompreniĝo necesas komuna neŭtrala internacia lingvo, kiun ĉiu homo povu paroli apud sia gepatra lingvo.”

Plena raporto aperos en la revuo *Esperanto* de UEA. La ĉiutaga kongresa bulteno *Kongresa Kuriero* estas havebla ĉe <https://uk.esperanto.net/2024/kuriero> .

UEA-Ĝenevo kaj UEA-Novjorko emfazis indiĝenajn lingvajn rajtojn kaj daŭripovon



Anticipe al sia festado de la Internacia Tago de la Indiĝenaj Lingvoj de la Mondo (9 aŭgusto), UEA substrekis la gravecon de tiuj lingvoj en la 17-a sesio de la Eksperta Mekanismo de la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj (EMRIP) en Ĝenevo de la 8-a ĝis 12-a de julio, kaj organizis flankan eventon en Novjorko dum la Altnivela Politika Forumo de UN la 9-an de julio.

“Ni rimarkas unuflanke la grandan valoron de la lingvoj de indiĝenaj minoritataj kulturoj kaj aliflanke ilian rapidan malaperon,” deklaris Mireille Grosjean, reprezentanto de UEA en Ĝenevo. Ĉiu homo en la mondo havu la rajton kompreni la mesaĝojn kiuj estas sendataj al ili de la koncerna registaro kaj ankaŭ la rajto respondi al ili en siaj propraj lingvoj. “Kiam ĉi tiuj indiĝenaj popoloj vidos siajn rajtojn garantiitaj, ili sentos sin traktataj kun justeco...” Tia situacio “kontribuos al paca vivo je individua kaj grupa niveloj” kaj implice igos ilin partneroj en la komuna intereso de la homaro pri la daŭripova evoluigo de nia planedo.

Samtempe, en Novjorko, UEA partneris kun la Komitato de Neregistaraj Organizoj pri Lingvoj kaj kun SIL Internacia, neregistara organizo kies fokuso estas lingva diverseco, en oficiala flanka evento de la Altnivela Politika Forumo de UN (APFUN), la tutgloba jara kunveno por taksi progreson pri la Celoj por Daŭripova Evoluigo.

Pluraj parolantoj atentigis, ke oni malofte traktas multlingvismon, kiu ja estas “kerna valoro” de UN, en rilato kun la celtabuloj kaj indikiloj de la Celoj. La fokusiĝo al Celo 16 en APFUN 2024 prezentas okazon por tamen esplori la esencajn ligojn inter lingvoj unuflanke, kaj “paco, justeco kaj fortaj institucioj” aliflanke. Precipe, la Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj, de la jaro 2022 ĝis la jaro 2032 sub gvido de Unesko, altiras novan atenton al la Deklaracio de UN pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj (angle: UNDRIP).

Indiĝenaj popoloj suferas eksterproportie pro malriĉo kaj la efikoj de klimata ŝanĝiĝo. “Egaleca aliro al justico por ĉiuj homoj,” unu el la subceloj de Celo 16, estas malfacile atingebla dum lingva diskriminacio daŭre ekzistas; kaj “inkluziva, partopreniga kaj reprezenta decidado” (alia subcelo de Celo 16), necesigas certigon, ke ĉiuj voĉoj estu aŭdataj. En tiu rilato, indiĝenaj lingvoj ludas esencan rolon kiel perilojn de egala aliro al justico, same kiel al edukaj, ekonomiaj kaj sociaj rimedoj.

La flanka evento renkontigis sciencajn fakulojn pri lingvaj rajtoj, gvidantojn de indiĝenaj komunumoj, kaj civilsociajn reprezentantojn kiuj aktive laboras en tiu fako. La aranĝon prezidis kaj kunordigis prof. Francis M. Hult kaj enkondukis prof. Humphrey Tonkin, respektive prezidanto kaj vicprezidanto de la Komitato, kiuj samtempe reprezentas Universalan Esperanto-Asocion antaŭ UN en Novjorko. Aparte eminentaj parolantoj estis d-rino Irmgarda Kasinskaite-Buddeberg (Unesko), kiu ĝis lastatempe estis la tutmonda gvidanto por la Jardeko, prof. Rawinia Higgins, kiu gvidas la Komisionon pri la Maoria Lingvo en Novzelando, kaj d-rino Barbara Trudell (SIL Internacia), plus indiĝenaj gvidantoj kaj fakuloj Tania Pariona el Peruo

(keĉua lingvo), prof. Hanna-Máret Outakoski el Finnlando (la samia), Mario Swampy el Kanado (krija nacio Samson), Leslie Harper (la oĝibŭa) kaj d-ro Anton Treuer (ankaŭ la oĝibŭa), ambaŭ el Usono.

Ĉerpante el dokumentitaj plej bonaj praktikoj kaj empiriaj esploroj, la parolantoj proponis unikan perspektivon pri la manieroj laŭ kiuj realigo de la subceloj de CDE 16 en rilato al indiĝenaj popoloj povas profiti el la Deklaracio de UN, kiu enkodigas la rajtojn de indiĝenaj popoloj al lingvoj en la kunteksto de (ekzemple) edukado, amasmedioj kaj registara administrado. Tiel, la Internacian Jardekon oni povas uzi por antaŭenigi Celon 16 per realigo de lingvaj rajtoj por novaj multlingvaj solvoj.

Kiel diris prof. Hult, “la Jardeko proponas unikan okazon por utiligi Celon 16 por plifaciligi la realigon de indiĝenaj lingvaj rajtoj.” Eĥis lin prof. Tonkin, kiu emfazis la gravecon doni voĉon al indiĝenaj popoloj: “Registaroj kaj iliaj reprezentantoj ne nur *parolu* la lingvojn de la mondo, sed *aŭskultu* la lingvojn de la mondo kaj ĉiujn ties parolantojn.”

La Internacia Jardeko pri Indiĝenaj Lingvoj estis ŝlosila temo en la Universala Kongreso de Esperanto, en Montrealo en la jaro 2022. La nunaj pliaj elpaŝoj reasertas la sindediĉon de UEA al lingva plurismo kaj lingva justeco por ĉiuj homoj.

Fakaj konferencoj ekzamenis Esperanton en Afriko kaj Azio

La 46-a Esperantologia Konferenco okazis en Aruŝo, Tanzanio, la 8-an de aŭgusto sub prezido de Bengt-Arne Wickström, de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Sesioj traktis la jenajn temojn: (1) Socilingvistiko kaj interlingvistiko en Afriko, (2) Afrikaj lingvoj kaj Esperanto, (3) Elstaraj figuroj de la Esperanto-movado, kaj (4) Evoluoj kaj apliko de Esperanto. Kiel fino sekvis diskuto pri la estonteco de Esperanto, sub gvido de Adjévi Adjé (Togolando) kaj Alexandrine Omba (DR Kongo). Inter la parolantoj en la konferenco estis d-roj Daniel Maxwell (Usono) kaj Élisée Byelongo Isheloke (DR Kongo) pri Esperanto kaj la svahila, Heidi Goes (Belgio) pri la historio de la Esperanto-movado en Afriko, kaj Ilona Koutny (Pollando k. Hungario) pri la kontribuoj de István Szerdahelyi al Esperantologio.

La historio de Esperanto en Azio estis la temo de faka konferenco en la Honkonga Universitato, Ĉinio, la 30-an kaj 31-an de aŭgusto, gvidata de Edwin Michielsen. Prezentiĝis 15 referaĵoj pri vasta gamo de temoj rilataj al la enkonduko kaj historio de Esperanto precipe en Japanio, Ĉinio kaj Koreio. Inter la temoj estis radioelsendado en Esperanto en la Japana Imperio, Esperanto en la japana teatro, Esperanto en anarkiista edukado en Suda Koreio en la jaroj post 1945, esperantistoj en Manĉurio (1905-1945), kaj la rolo de Hasegaŭa Teru en la kontraŭmilita movado en Ĉinio en la 1930-aj jaroj. Aliaj referaĵoj traktis Esperanton en koloniaj Malajo kaj Singapuro, rezistan literaturon en Esperanto en Honkongo (1938-39), kaj la historion de Esperanto en brita Hindio.

La 26-a de julio: Esperanto-tago reeĥis tra la mondo

Kunvenoj kaj eventoj en Ĉinio kaj Rusio, en Francio kaj Japanio, en Brazilo kaj Aŭstralio; eklumo de sociaj medioj; gazetaraj artikoloj kaj mesaĝoj – Esperanto-Tago estis tago de festado en ĉiu angulo de la mondo. La kialo? La 26-an de julio 1887, Zamenhof publikigis sian novan lingvon, Esperanton.



La mesaĝo de UEA okaze de la Esperanto-tago emfazis la gravecon de Esperanto el perspektivo de homaj rajtoj. Ĝi citis Artikolon 2 de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj: “Ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en tiu ĉi Deklaracio validas same por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato.”

Artikolo 2 “klare kondamnas la neadon de lingvaj homaj rajtoj al popoloj, grupoj, etnoj, komunumoj malgrandaj, malfortaj, politike ne influaj; kaj pozitive asertas la bezonon batali kontraŭ lingva diskriminacio,” la mesaĝo deklaras. Ĝi sekve difinas lingvan diskriminacion, kiu okazas “kiam homoj pli fortaj, pli potencaj, pli kleraj, pli riĉaj parolas en siaj gepatraj lingvoj al aliaj alilingvaj homoj, kiuj provu kompreni kaj provu respondi, se ili kapablas.”

“Lingva diskriminacio,” laŭ la mesaĝo, “estas ofte ne rekonata de tiuj, kiuj diskriminacias kaj eĉ de tiuj, kiuj estas diskriminaciataj.” Kaj tio ne esceptas Unuiĝintajn Naciojn “kiu estas la sola dialogo-punkto, pri kiu disponas nia planedo,” sed ĝi ne plene aplikas tion, kion la Deklaracio pri Homaj Rajtoj implicas: ĉies rajton kompreni kaj esti komprenata. UN havas kelkajn grandajn lingvojn kiel oficialajn lingvojn, sed fakte ĝi utiligas nur kelkajn el la plej grandaj por paroli al la mondo. Sekve, ĝi emas aŭskulti nur tiun etan parton de la mondo, kiu kapablas respondi en tiuj plej grandaj lingvoj. Ĉu tio estas la plej efika maniero por mobilizi mondajn civitanojn por atingi solvon de monde gravaj problemoj, ekzemple la Celoj por Daŭripova Evoluigo, la dialogo pri la klimato, aŭ la serĉo de paco?”

Kontraste, asertas la mesaĝo de UEA, Esperanto estis kreita “por ke en la mondo ĉiu rajtu paroli sian lingvon ĉe si” kaj “por ke ĉiuj lingvoj vivu, kaj ... ke la dialogo inter malsamlingvaj grupoj okazu sen premo de unu al la alia, sed en egaleca maniero, sen diskriminacio....”